

RAPORTO
pri la Komplete Demandaro por Esperantaj
Junularaj Organizo (KODEJO) 2015



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam, Nederlando

www.tejo.org

Pretigis kaj redaktis

Ariadna García Gutiérrez, Respondeca Estrarano pri Landa kaj Regiona Agado

Kompilis

Arina Osipova, Ĝenerala Sekretario de TEJO

la 4-an de septembro 2016

Enhavo

Enkonduko

Partoprenintoj

Landaj Sekcioj

Fakaj Sekcioj

Aldone

Strukturo

Financa stato de la Organizo

Financaj raportoj

Subvencipetoj

Membraro

Varbado

Membroadministrado

Kunlaboroj

Kunlaboro kun aliaj LS-j

Kunlaboro kun aliaj ne-Esperanto-organizoj

Membreco en Nacia Junulara Konsilio

Estraro

Informiloj

Renkontiĝoj

Konkludoj

Enkonduko

La Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizo (KODEJO) estis lanĉita pasintjare dum la monato decembro kaj estis malfermita por plenigo ĝis marto 2016. Jaro post jaro la ĉefa celo de la demandaro estas estas ekkoni la aktualan staton de la landaj sekcioj (ĉi jare ankaŭ aldoniĝis la fakaj sekcioj) de TEJO, havi pli da informoj pri iliaj situacio, agadoj, sukcesoj kaj problemoj, analizi ilin por labori survoje al pli efika agado kaj al plia kunlaboro.

Respondis la demandaron 26 landajn sekciojn kaj 3 fakajn sekciojn (inkluzivante Verdajn Skoltojn kiuj ne ankoraŭ estas faka sekcio de TEJO sed survojas al tio). Plejparto de la respondintaj landaj sekcioj estis el Eŭropo (14), sekvis Ameriko (6), Azio (3), Afriko (1) kaj el Rusio kaj Ukrainio po 1.

Kompare al 2013, lasta jaro kiam estis preparita raporto pri KODEJO, la kvanto da respondoj malpliigis de 31 al 29.

Daŭra bedaŭro estas la fakto de ne ekzistantaj LS-j en Oceanio, temas pri unu el la gravaj defioj de la Organizo por plu atingi pli vastan internaciecon.

Partoprenintoj

Landaj Sekcioj

- Junularo Esperantista Brita (JEB)
- Kolombia Esperanta Junulara Organizo (KOLOMBEJO)
- Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
- Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
- Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)
- Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS)
- Nepala Esperanto Junulara Organizo
- Pola Esperanto-Junularo (PEJ)
- Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
- Rusia Esperantista Junulara Movado (REJM)
- Vjetnama Esperanto-Junularo (VEJO)
- Juna Esperantistaro Argentina (JEA)
- Junulara Esperantista Burundia Organizo (JEBUO)
- Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
- Meksika Esperanto-Junularo (MEJ)
- Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO)
- Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- Itala Esperantista Junularo (IEJ)

- Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
- Norvega Junularo Esperantista (NJE)
- Aŭstria Esperanto Junularo (AEJ)
- Junularo Esperantista Kanada (JEK)
- Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO)
- Ukraina Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ)
- Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO)

Fakaj Sekcioj

- Biciklista Esperanto-Movado Internacia (BEMI)
- Esperanto-Universala-Rok-Organizo, Kolektiva Komunik-Asocio (EUROKKA)


Aldone

- Verdaj Skoltoj

Strukturo

Rilate al strukturo, pli ol duono (19) ne deklaris sian strukturon, eĉ ne skribis aldonajn komentojn pri la temo. Inter tiuj kiuj ja respondis, evidentiĝis ke 4 estas Junularaj Sekcioj de Nejunularaj Organizoj, 5 estas Sendependaj Organizo kun Jura Personeco kaj 1 estas Sendependa Organizo sen Jura Personeco.

Ilustrajo 1. Strukturo



Financa stato de la Organizo

En tiu ĉi momento plejparto de la sekcioj de TEJO havas pozitivan financon (14), alia sufiĉe alta cifero ne havas financojn entute (10) kaj la malpli alta nombro (5) estas relative riĉa, ĝenerale temas pri pozitiva financa bonfarto.


Financaj raportoj

Rilate al la financaj raportoj, tiuj ĉi informoj iom malkongruas kaj malseriozigas la laboron en, pro tio ke, al la demando “Ĉu via sekcio eldonas financajn raportojn” plejparto de la respondoj estis neaj (16), aliaj (9) respondis jese al la fakto ke almenaŭ unufoje jare estas skribita financa raporto kaj aliaj (4) respondoj temis pri neregulaj eldonoj de financaj raportoj.

Subvencipetoj


Dum la lastaj jaroj la junulara internacia organizo sukcesis videbligi la utiligon de tiu ĉi agadkampo kiel tikla kaj tre grava, kaj por spertigi niajn aktivulojn rilate al temoj pri merkato, alekstera informado, negocado, komunikkapabloj kaj entute profesieco; kaj kiel kerna agado por finace pluvivigi kaj evoluigi ne la internacian agadon.

Ilustraĵo 2. Subvencipetoj



De tiuj LSj ricevas aŭ iam ricevis iam subvenciojn 6 LSj el Eŭropo, 1 el Azio kaj 1 el Afriko sensukcese petis subvenciojn, kaj 6 LSj el Ameriko neniam petas subvenciojn.

Ilustraĵo 3. Laŭkontinenta agado pri subvencioj




Membraro

Informi pri membroj ĉiam estas tikla kaj malfacila respondo, pro tio ke ĝenerale aktivaj membroj ĉiam multas kompare al aligitaj membroj, kialoj pluras en tiu fakto, teknologioj kaj malfacilaĵoj por renkontiĝi aŭ partopreni eventojn aŭ simpla malemo pagi kotizon.

La kvanto da kotizpagantaj membroj estas plej malsamaj, kaj rilate al la membronombro ĝenerale, la ilustraĵo montras kiel plejparto de la respondoj (18) evidentigas stabilecon de la membraro en la sekcioj, malpli oftaj respondoj (6) konfirmas kreskigon de la membraro, evidente positiva fakto, kaj aliflanke (5) malkreskigo de la membraro, pri kio ni ja devas resti atentaj ĉar temas pri (kvazaŭ) eta ekvilibro inter la kresko kaj malkresko de la membronombroj.


Ilustraĵo 4. Membronombro



Varbado

Temis pri tre interesaj respondoj rilate al tiu ĉi temo. Kvankam ĉiu organizo mempreparas diversmaniere siajn varbadkampanjojn, plejparto fokusiĝas en *kursoj* (7), tio signifas ke multaj el niaj gejunuloj multe pli okupiĝas pri instruado, tre interesa por nia agado. Bonus pli atente sekvi tiun ĉi agadkampon kaj instigi komunajn projektojn kaj interesajn instruajn eventojn pri instruado-lernado, cele al la junularo. La aliaj respondos rilatis al varbado pere de organizado de eventoj, disvastigo pere de sociaj retoj, kiel ekzemple Facebook, retaj kursoj kiel la aktuale furora Duolingo kaj en malpli alta kvanto (po 1) okazigo de prelego kaj socikulturajn eventojn.

Ilustraĵo 5. Varbadmanieroj



Membroadministrado

Rilate al la membroadministrado bona rezulto estis ke plejparto de la landaj sekcioj (19) posedas mastrumadsistemon por registri sian membraron, alian kvanton (3) ne registras entute kaj la resto (7) ankaŭ ne havas mastrumadsistemon por siaj membroj, tamen iel kalkulas ilin.


Kunlaboroj

Kunlaboro kun aliaj organizoj

Klaras ke kunlaboro inter organizoj estas ankaŭ malfacila tasko. Ĝenerale esperantistoj interkomunikas, sed arigi la tutan aktivularon aŭ plejparto de ili, plifacilas pere de diversaj projektoj kiuj povas kovri plej ampleksan grupon da intereso kaj ŝatokupoj.

Ĉijare al la demando pri kunlaboro inter organizoj, estis interesa koincido, la sama kvanto po respondoj (11) rilatis, unuflanke al la personaj kunlaboroj, kaj la alia al regula kunlaboro inter organizoj, ne tiel respondis restantaj 7 neante ajnan kunlaboron.


Ilustraĵo 6. Kunlaboro inter la organizoj



Kunlaboro kun aliaj ne Eo-Organizoj

La kunlaboro kun aliaj ne Esperantaj Organizoj estas plifortigenda ekde loka kaj regiona vidpunktoj. Pro la fakto ke ne ĉiuj kontinentoj samas (kompreneble) bezonatas ekspluati multe pli la temon, ne nur ekde financa vidpunkto (kio ja helpas vivteni la Organizon ĉimaniere) sed ankaŭ por disvastigi la agadon de la komunumo.

Ilustraĵo 7. Kunlaboro kun ne Eo-Organizoj



Membreco en Nacia Junulara Konsilio

La Naciaj Junularaj Konsilioj celas antaŭenigi la junularan partoprenon en la diversaj sociaj projektoj de la lando aŭ en ĝi. En la demandaro estis parto informi pri la membreco aŭ ne de la LSj en la Naciaj Junularaj Konsilioj, kompreneble ne en ĉiuj landoj ekzistas Naciaj Junularaj Konsilioj, tamen, indus pli kaj pli instigi la junularon membri ilin.


Ilustraĵo 8. Membreco en la Nacia Junulara Konsilio



Estraro


Jen ĉapitro dediĉita al la agado de estraro kaj estraranoj. Estas iom malfacile klarigi la situacion pri la estrara agado en la LSj ĉar terminoj pri estraranoj aŭ gvidantoj de la organizoj, diversas. Sinteze eblas konkludi ke plejparto de la LSj ne havas entute estraron. Plejparto de la respondoj (19) rilatis al la ekzisto de estraranoj kaj/aŭ aktivuloj, aliaj 4 ne havas estraron aŭ jam kadukis, kaj restantaj 6 ne respondis. El la tuto nur unu LS havas tutan estraron nome: prezidanto, vicprezidanto, kasisto, sekretario kaj aliaj estraranoj.

Ilustraĵo 9. Okazigo de Ĝeneralaj Asembleoj




Evidentas ankaŭ ke la realigo de ĝeneralaj asembleoj plejparte estas malmulta.

Ilustraĵo 10. Elektro de Estraranoj




Rilate al la elektro de nova estraro estas pozitiva fakto ke granda kvanto da respondoj (19) temis pri tio ke regule okazas elektro de nova estraro. Male okazas rilate al la fizikaj kunvenoj, al la demando *Ĉu la estraro fizike kunvenas?* Jen la respondoj:

Ilustraĵo 11. Okazigo de fizikaj kunvenoj de la estraro




Kaj kun la novaj teknologioj pri informado kaj komunikado, la agado fariĝas pli facila (por kelkaj) kaj la respondoj pri retaj kunvenoj donas pli pozitivan impreson rilate al realigo de estraraj kunvenoj.

Ilustraĵo 12. Okazigo de retaj kunvenoj



Labori per estraraj diskutlistoj estas internacia praktiko jam de antaŭ kelkaj jaroj, tamen, la agado ne devas esti sama en ĉiuj mondopartoj, pro tio diverseco ankaŭ bonas tiusence, kaj kvankam evidentiĝas kiel internacia kaj plifaciliga praktiko por kunlaborado, ĉi jare restas klare ke malpli alta kvanto da respondoj (18) temis pri ne uzado de estraraj diskutlistoj.


Ilustraĵo 13. Estrara Diskutlisto



Informiloj

Jen ero rilate al la diversaj informiloj kaj informanieroj uzataj de la sekcioj. Rilate al la informiloj plej uzataj en la lastaj tempoj, troviĝas ĉefe la sociaj retoj kiuj jaro post jaro pli kaj pli furoras, ĉefe por la gejunuloj. Esperantujo ne restis for de tiu ĉi praktiko kaj jen la respondoj rilate al la reprezento de la sekciojen sociaj retoj:


Ilustraĵo 14. Reprezento en sociaj retoj



Same la organizoj havas retpaĝojn, sed plejparto (17) ne havas ilin ĝisdataj, de tiuj nur 9 havas kaj ĝisdatigas ilin.

Bona rezulto pri tio estas la uzo kaj de la naciaj lingvoj, kaj de Esperanto en la naciaj retejoj, en multe pli granda kvanto (22) ol nur la uzo de la naciaj lingvoj.

Ilustraĵo 15. Lingvoj de la retejo




Rilate al la internaj komunikiloj, eblas mencii rubrikojn en aliaj revuoj (10) kaj retaj novaĵleteroj (3). En malpli granda kvanto (po 1) grupoj ĉe facebook kaj whatsapp kaj propraj elektronikaj eldonoj.

Renkontiĝoj

Organizado de renkontiĝoj estas la praktika maniero kie la novaj esperantistoj povas konatiĝi kun Esperantujo, pro tio bezonatas ke pli kaj pli la landaj sekcioj transprenu la torŝon kaj la gvidon de organizado de renkontiĝoj, kompreneble temas pri malfacilaj kaj postuliga tasko, tamen inda por evoluigi ekde ĝenerala vidpunkto la landan kaj regionan agadon, mi dirintus eĉ, la interkontinentan agadon.

Ilustraĵo 16. Kunorganizado de internaciaj renkontiĝoj



Konkludoj

Mi kredas ke la celo de KODEJO ne devus esti nur ekkoni la situacion, agadon kaj staton ĝenerale, de la sekcioj de TEJO, pli ol tio, indus ke KODEJO estu informanalizo cele al pli ampleksa strategio rilate al la landa kaj regiona agado kaj kia estu la vera rolo de la Organizo por certigi la daŭran aktivadon de la junularo, kaj rigardante iom pli estontece, por certigi la plu ekziston de la ĝisnunaj landaj kaj fakaj sekcioj kaj havigo de novaj. Tiusence, mi havas kelkajn konkludojn kaj rekomendojn.

Konkludo 1: Financaj raportoj

La financoj en la esperantaj volontulaj organizo konsistas unu el la ĉefaj rimedoj por ebligi daŭran ekziston kaj de nia aktivularo kaj de la Esperanto-movado ĝenerale, sen ili eblas realigi prezkaŭ nenium internacian agadon, unu el la ĉefaj pilieroj de nia ekzisto. Tiusence ne nur gravas havi la monrimedojn sed ankaŭ la informagado kaj informfluo ene de la propraj organizoj, pri la fontoj de tiaj monrimedoj, ĝia utiligo kaj ĉiujara planata buĝeto. Temas ne nur pri konscia tasko kiu pravas kaj atestas gajnojn kaj perdojn, sed pri la strategia ebleco por racie utiligi kaj plikreskigi ĝin.

Konkludo 2: Subvencipetoj

La ĉefa agado tiusence ĝis nun plejparte efektiviĝis en Eŭropo, pro tio indas ankaŭ strebi al plia kunlaborado inter la plej spertaj aktivuloj pri tiu temo cele al realigado de simila agado en la propraj landoj kaj regionoj ekster tiu ĉi kontinento.

Konkludo 3: Membroadministrado

Evidente havi sistemon por registri la membraron en asocio, estas unu el la plej gravaj aferoj por scii kun kiom da aktivuloj ni ja kalkulas en niaj landaj sekcioj por antaŭenigi nian movadon kaj regione kaj internaciskale, kvankam plejparto de niaj respondintaj landaj kaj fakaj sekcioj jesis pri la temo, evidentiĝas la grava rolo kiu povas plenumi TEJOn en tiu ĉi tasko, ebligi komunan mastrumadsistemon al niaj landaj sekcioj.

Temas ja pri postuliga tasko, tamen inda, homfortojn ĉiam mankantas, do, pli ebligi al niaj sekcioj ilojn por plifaciligi la laboron estas unu el niaj daŭraj defioj kiel aktivuloj.

Konkludo 4: Kunlaboro inter la organizoj

Indas multe pli instigi la agadon al specifaj projektoj aŭ taskoj kun specifa tempoplano kaj atingeblaj rezultoj kadre de la rimedoj de la sekcio mem (kompreneble TEJO kiel la internacia kaj tegmenta organizo devas resti je la dispono diversmaniere) sed la respondencoj venu de la landaj sekcioj mem, kompreneble dum estu forto kaj homfortoj.

Kvankam estas tre pozitiva fakto ke entute 22 respondoj temis pri ekzisto de kunlaboro inter la diversaj sekcioj de TEJO, indas emfazi kiaj kunlaboro estas, pri kiuj temoj, ĉu pri konkretaj projektoj aŭ ĝenerale pri interŝanĝaj vidpunktoj rilate al ĝenerala agado.

Konkludo 5: Informiloj

Pozitiva afero estas ke plej parto de la landaj kaj fakaj sekcioj utiligas la diversajn ilojn (plejparte la novaj) por vivteni la komunikadon, disvastigi kaj utiligi la lingvon inter la junularo, tamen evidentiĝis malforto en la interna komunikado, indas ankaŭ uzi la internajn rimedojn por informi pri nia agado kiel landa kaj/aŭ faka sekcio, samkiel disvastigi ilin por montri al la aliaj esperantistoj niajn atingojn por la komunumo, tio vere gravas.

Rekomendo 1: Membraro

Aldoni al la demandaro aŭ aparte prepari pli oftajn analizojn rilate al faktoroj kiuj kutime influas la malkreskon de la membronombroj en niaj landaj sekcioj, aliflanke uzi la pozitivajn aspektojn kiuj influas la malon kaj profiti ambaŭ por instigi al plia kreskigo kaj eviti malkreskigon de la membronombroj.

Rekomendo 2: Membroadministrado

Aldoni al la demandaro iun pli specifan klarigon pri la uzataj sistemoj en la diversaj landaj sekcioj por enkalkuli siajn membrojn.

Rekomendo 3: Kunlaboro inter landaj kaj fakaj sekcioj

Indas aldoni al la demando priskribi kies kunlaboro ekestas, tio ankaŭ plibonigos la strategion de TEJO kiel supera organizo kaj plifaciligos ĝian gvidan rolon rilate al la landa kaj regiona agado.

Fine, temas pri bonaj rezultoj ĝenerale, tamen, pluraj defioj alfrontendas rilate al la landa kaj regiona agado.